
# La Krokodil’



Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 rue Jean Aillet, 31000 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77; courriel toulouse@esperanto.org
N-ro 18 — februaro 2003

## Nous avons fait / Ĉe ni okazis

### Rusaj vesperoj

Mikaelo Bronstein venis ĉe nin dimanĉe posttagmeze, ĉirkaŭ la 14a00, kun Arno, sub pluvego. Tiu aŭta veturigo estis bonvena, ĉar li havis tempon ripozi iom kaj prepari sin, anstataŭ alveni en la stacidomo ĵus antaŭ la prezento.

La prezento mem estis agrabla. Estis en la esperantoklubo de niaj fervojistaj amikoj, kaj ni kunigis 20-on da esperantistoj, el kiuj sufiĉe multaj estas pli-malpli novaj. Mikaelo kantis dum proks. unu horo, kaj poste ni plu diskutis manĝante reĝkukojn kaj trinkante ĉu cidron, ĉu sukojn.

Lunde matene, Mikaelo estis intervjuita de Christian Lavarenne por *Le Monde de l'Espéranto*. La parolemo de Mikaelo faras el tio facilan taskon. Poste li iris kun Jacques Caubel por iom viziti la urbon.

Lunde vespere okazis la ĉefpunkto de lia vizito: Muzika rusa vespero kunorganizita de ni kaj *Solnitchko*, loka slav-franca kultur-asocio, lau instigo de komuna membro, Jomo, por kanti kaj «babilprelegi» en la rusa lingvo (kaj eventuale esperanto), kun traduko francen.

Ĉeestis pli ol kvindek personoj, el kiuj 11 esperantistoj, kelkaj interesitoj pri esperanto, sed ĉefe membroj aŭ simpatiantoj de Solnitchko. Mikaelo kantis kaj parolis en la rusa lingvo, kun tradukado fare de juna rusino kiu vivas en la regiono de pluraj jaroj.

Bedaŭrinde, post kelkaj kantoj, Mikaelo plendis pri brakdoloro, klarigante ke lia brako rompiĝis antaŭ kelkaj monatoj, kaj ke li ankoraŭ ne retrovis la tutan flekseblecon necesan por facile ludi gitaron (la antaŭan vesperon li fakte multe ludis por la esperantistoj!). Do, li recitis poemojn, siajn kaj tiujn de konataj rusaj autoroj, kiel Puŝkin, Josif Brodskij, ktp.

Poste li respondis demandojn de la ĉeestantoj. Tiuj demandoj estis malmultaj, kaj apenaŭ temis pri politiko (Mikaelo diris ke por li estis tiel pli komforte). Unu neesperantisto demandis kiel Mikael povis lerni esperanton en Rusio. Aliajn trafajn demandojn ĉefe metis Jomo, en esperanto, kio ebligis al Mikaelo respondi ankaŭ en tiu lingvo.

La renkontiĝo finiĝis iom post la 23a00. La organizantoj de ambaŭ asocioj, EKC kaj Solnitchko, estis tre kontentaj pri la okazaĵo.

Marde matene, Mikaelo forveturis trajne por novaj aventuroj en Béziers!

– Rikardo

Por mi kiu tute ne komprenas la rusan, mi devas diri ke aŭdi Mikaelon deklami en la rusa esti tre agrable: mi tre ŝatis la «muzikon» de tiu lingvo. Ankaŭ en esperanto Mikaelo havas perfektan prononcon, kaj sufiĉe laŭtan kaj klaran vochon, estis do orela plezuro aŭskulti lin.»

– Jeannette

### Tema manĝoklaĉo: Eŭropa Socia Forumo

La 7an de februaro ni havis interesan manĝoklaĉon, kun ok personoj. Du (Jean-René kaj Hélène FUNEL) partoprenis la unuan fojon en manĝoklaĉo, kaj parolis al ni pri sia sperto dum la Eŭropa Socia forumo de Florence, kiu okazis en novembro. Poste ekestis interesa diskuto. Ni parolis ankaŭ pri la venonta eŭropa forumo, kiu okazos en novembro en Parizo/St Denis. Se Esperanto-France ne volas mem partopreni, kial ne aranĝi kolektivon de regionaj federacioj, kiuj organizu, kunlabore kun SAT-amikaro kaj FET, partoprenon de la esperantista movado?

### 2a rapidkurso baldau finiĝos, la tria komenciĝos

La 27an de januaro komenciĝis la dua sessemajna rapidkurso de esperanto, kun 5 lernantoj.

Ekde la 10a de marto ekos la tria sesio, por kiu oni jam akceptas enskribiĝojn. Kosto: 35 €, entenanta aliĝon al la asocio. Studentoj pagos nur 15 €.

Al ĉiuj studintoj estos proponataj semajnfinaj staĝoj, ĉu sabate, ĉu dimanĉe, ĉu tutan semajnfinon.

# Ĉe ni okazos

## Prelego pri la Suda Kanalo

Vendredon 14/02, Jacques CAUBEL prezentos prelegon pri la Suda Kanalo, je la 20a horo en la Fervojista klubejo (9 rue Marengo). Oni povos komune manĝi en la fervojista restoracio ekde la 19a horo.

## Solidareco kun Senegalio

Anoncite dum la Zamenhof-festo, la solidareca agado iniciatita de A. Lagrange kaj Christine Petit konsistos el monkolekto por helpi virinan lernejon apud Dakaro. Tiu vesperlernejo, funkciigita de esperantistoj, kun volontulaj instruistoj, celas instrui kalkulon kaj la francan lingvon.

Temas pri junuloj kiuj ne povis viziti lernejon kiam ili estis infanoj. Ili studas vespere post tago da hejmlaboro: plej multaj el ili servas en domoj kontraŭ tre malalta salajro. Por ebligi al ili plu studadi iuj bezonas monan helpon: 15 eŭroj ebligas al unu junul(in)o studi tutan jaron. Por pli da informoj: arnaud.lagrange@wanadoo.fr , aŭ 05 61 83 91 59.

## Solidareco kun Bosnio

Mi ricevis malĝojigan novaĵon de Fetah ZVIRAC, kiu akompanis la infanojn de Sarajevo en 1998: lian edzinon trafis grava malsano, por kiu la kuraciloj estas ege multekostaj (2200 eŭroj monate dum tri aŭ ses monatoj), dum la inĝeniera salajro de Fetah estas 400 eŭroj monate. Li petas de ni helpon. Mi proponas kolekti monon kaj sendi al Fetah, aŭ aĉeti la medikamentojn ĉi tie kaj sendi ilin.

## La biblioteko: *novaj fakoj*

La biblioteko de EKC formiĝas. Baldaŭ la literatura sekcio estos preta, kun nova fako: *Facilaj legaĵoj*.

Alia nova fako estas *Novaj akiraĵoj* – libroj pruntedonitaj fare de niaj membroj, kiuj restas ilia propraĵo. Se vi havas kelkajn librojn, prefere *novajn kaj aktualajn*, bonvolu pripensi pruntedoni ilin. Dankon.

# Novaĵoj de la regiono

## De nouveaux cours d'espéranto

**Lavaur**

Depuis octobre, 6 personnes suivent assidument tous les mercredis le cours d'espéranto donné par Daniel Maynau. Un visiteur japonais (Ljo) a été accueilli, et les élèves ont été heureux de constater qu'ils pouvaient communiquer avec lui ! Le groupe envisage maintenant d'inviter la troupe théatrale toulousaine à venir présenter sa pièce.

**Revel**

« Merci, grâce à vous nous avons rencontré Christian Pons et nous allons prendre des cours sur Revel le vendredi soir ( une petite équipe) », nous écrit V. Chassagne avec enthousiasme.

# Novaĵoj el Esperantujo

## KVINPETALO esperanto-centro

Rue du Lavoir FR-86410 BOURESSE
T/faksilo: +33 (0)5.49.42.80.74
<kvinpetalo@club-internet.fr> http://hometown.aol.com/yannickdum/kvinpetalo.html

**P R O G R A M O 2 0 0 3**

**FEBRUARO** PRAKTIKADO DE LA LINGVO
18a-22a por infanoj kaj plenkreskuloj
1a nivelo: Marie-Hélène Sautet
2a nivelo: Juanita Turbillon

**FEBRUARO** PREPARADO AL KAPABLECO
25a-1a marto skriba kaj parola
Georges Lagrange

**APRILO** INICADO KAJ PRAKTIKO DE JOGO
14a 18a Arlette Plutniak
kaj samtempe PAROLIGA KURSO
Katalin Kováts

**APRILO** PROBLEMOJ LINGVOSCIENCAJ KAJ
29a-3a majo GRAMATIKAJ en la nova eldono de PIV
Michel Duc Goninaz

**MAJO** STELLAN ENGHOLM kaj la
8a-11a Malgranda Revuo (1943-1952)
Johano Rapley

**MAJO** BOTANIKO: observado en la naturo
29a-1a junio kaj terminologio
Philippe Pellicier

**JULIO** RADIOFONIA TEATRAĴO
8a-12a kun realigo de KD (kompakta disko)
Serge Sire, Georges Lagrange

**JULIO** Realigo de BILDRAKONTOJ
15a-19a (ne necesas esti kapabla desegni)
Serge Sire

**JULIO** INICADO KAJ PRAKTIKADO. °°° 22a-26a Initiation à l'Espéranto selon la méthode Freinet kun Mariette Bernardin
PRAKTIKADO lau Freinet-metodo
2a nivelo: Suzanne Bourot

**AUGUSTO** IO PRI MUZIKO kaj
12a-16a PRAKTIKADO DE LA LINGVO
Anne-Sophie Markov

**AUGUSTO** PREPARADO AL ALTAJ STUDOJ:
19a-23a skriba kaj parola parto
Janine Dumoulin, Georges Lagrange

**SEPTEMBRO** instruado kaj vivo de andreo Cseh
12a-19a kun provlecionoj de la Ĉe-kurso
Ed Borsboom
kaj samtempe piedmigrado
kun Monique Dussenty, Thérèse Pinet

**OKTOBRO** PRAKTIKADO DE LA LINGVO
lasta semajno 2a nivelo: Suzanne Bourot
3a nivelo: Georges Lagrange
**DECEMBRO** ZAMENHOFA SEMAJNO:
6a-10a Zamenhof kaj medicino
Jean-Luc Tortel

## KULTURDOMO KASTELO GRESILLON (49150 Baugé)

### Provizora programo 2003

26/4 - 3/5 : Tutsemajno Verkado-Staĝo; organizita de Centre Culturel Nantes-Esperanto kaj Centre Culturel Esperanto-Touraine ; kun Anna Lowenstein kaj alia verkisto.
informas : Christian Rivière ; tel :02.40.25.24.05

8/5 - 11/5 : kongreso de FET (Fédération Espérantiste du Travail)
informas : Vincent Charlot ; esperant@noos.fr

**29/5 - 1/6 : KEFO (kongreso de Esperanto en Francio)** informas : UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS, tel : 01 42 78 68 86, **www.esperan-to-france.org**

7/6 - 9/6 : Renkontiĝo de Esperanto-44
informas : Martine Rivière ; tel : 02.40.25.24.05
aŭ Luc Gouverneur ; tel : 02.40.74.69.34

5/7 - 12/7 : REF (Renkonto de Esperantistaj Familioj)
informas : Bert Schuman ; bsn@aql.fr

12/7 - 19/7 : diversgradaj kursoj, prelegoj
informas : kastelo.gresillon@free.fr

19/7 - 26/7 : diversgradaj kursoj, prelegoj
informas : kastelo.gresillon@free.fr

26/7 - 2/8 : diversgradaj kursoj, prelegoj
informas : kastelo.gresillon@free.fr

2/8 - 9/8 : diversgradaj kursoj, prelegoj
informas : kastelo.gresillon@free.fr

9/8 - 16/8 : diversgradaj kursoj, prelegoj
informas : kastelo.gresillon@free.fr

23/8 - 30/8 : neformala renkontiĝo
informas : kastelo.gresillon@free.fr

## KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

CH 2301 La Chaux de Fonds (Svislando)
CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, tel/fakso (41)32 9267407, kce.esperanto@blue-win.ch .

**Programo**

Februaro 22-23
"La Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj" kun d-ro Giorgio Silfer, kunaŭtoro kaj subskribinto de la Deklaracio.

Marto 29-30
"La historia rolo de Ivo Lapenna: ĉu eblas objektiva esploro?"
Enkondukas prof. Carlo Minnaja, redaktoro de la libro "Eseoj memore al Ivo Lapenna".
Partoprenos s-ino Birthe Lapenna.

Aprilo 17-21
5a PIK Plurnivela Internacia Kursaro (printempa sesio)
Komenca grado kun hungara instruist(in)o. Progresiga grado kun Giorgio Silfer, laŭ Esperanto 2 de István Szerdahelyi.
Perfektiga grado kun Perla Martinelli, laŭ 'Paŝoj al plena posed' de William Auld.

Majo 24-25
"Socia Esperanto-Forumo: kiaj perspektivoj en Eŭropo?" Enkondukas Kristian Garino, aktivulo en Florenco, federalisto.

Julio 5-12
Naturamika semajno en Grindelvaldo
Gvidas Francisko Degoul. Kun jarkunveno de TANEF.

Julio 12-19
76a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda
Paralelaj kursoj por progresantoj kaj perfektiĝantoj

Julio 20-25
Unua sesio de la Esperantologia Fakultato

Julio 20-25 kaj Julio 27-Augusto 1
Paralelaj kursoj por komencantoj, progresantoj, perfektiĝantoj

---

Le Cercle Biterrois d'Espéranto présente son:

**20ème Stage de printemps** du 14 au 21 mai

à La Dragonnière, 34 VIAS, à 8 km d'Agde.

Pension complète ou camping.
3 niveaux, participation internationale

Info : Christian HERBETTE, T/F : 04 67 21 86 61 Chrizo@worldonline.fr

## PLOUEZEK 16a-23a aŭg.

22 (apud Paimpol) Bretonio

7aj Internaciaj Renkontiĝoj

# PLUEZEK



Kursoj : 3 horojn ĉiumatene.
Posttagmeze : Teatro, ĥorkanto, Jogo, Turismumo, ktp.
Kulturaj vesperoj.
Internacia partoprenantaro.

## *29ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPÉRANTO*

**23-30/08-2003** "le lazaret" 34 sète

SÉJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

*L'association "Espéranto culture et progrès" vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.*

*Profitez-en pour passer en même temps d'agréables vacances à SÈTE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.*

*Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions et ... bonne nourriture.*

Programme :
Matinée : Cours de plusieurs niveaux.
Après-midi : excursions, cours ou temps libre.

Soirée : programme culturel ou divertissements

ESPERANTO CULTURE ET PROGRÈS
5, rue Docteur Roux
FR 34090 MONTPELLIER Francio
tel : 04 67 54 15 43

## Des rencontres sélectionnées à l'étranger

### 27ª Internacia Junulara Festivalo (IJF)

Savona (50 km de Gênes) ITALIO
Aprilo 16-22
«Inter tutmondiĝo kaj lokismo: kia identeco por gejunuloj?»

Tutmondiĝo, «no-global», G8, socia forumo... Ĉiuj vortoj kiuj cirkulas de buŝo al buŝo kiel legendo; kaj same kiel ĉiu legendo, la dirajoj tre malmulte proksimiĝas al la vero.

Inter tiom da debatoj, artikoloj kaj libroj, pli aŭ malpli seriozaj, junuloj estas la kategorio kiu plej malgajnas. Aperintaj de malmulte ĉe la spegulo de la mondo, ili restas mirigitaj antaŭ la novaj teknologiaj evoluoj, kiuj ja helpas proksimigi la mondon sed aliflanke pligrandigas la diferencon inter «riĉaj» kaj «malriĉaj» landoj.

Kion ni povas fari por ke la pozitivaj trajtoj de tutmondiĝo estu atingeblaj por ĉiuj? Ĉu ni junuloj povas kontraŭstari ĝiajn nenombreblajn negativajn sekvojn? Aŭ ĉu ni povas fari nenion, ĉar ĉion decidas plenkreskuloj?

Dum la Festivala semajno ni klopodos respondi tiujn demandojn, per prelegoj kaj diskutrondoj, ekante precipe de viaj spertoj.

GRAVE! Dum la Festivalo okazos seminario celanta precipe la aktivulojn de Eŭropaj Esperantaj Junularoj por evoluigi kelkajn kapablojn: kiel prepari financan raporton aŭ subvencipeton, kiel organizi prelegon, kiel skribi gazetan artikolon... Ĉeestu! Vi havos ŝancon lerni ion novan dum vi amuziĝas.

http://iej.esperanto.it/iej/ijf

18a Printempa Semajno Internacia (PSI)

Bonn (Germanio) Aprilo 14-21

Jam tradicia rendevuo por ĉiuaĝuloj, ĉirkaŭ la paska tempo. Apartaj programeroj por infanoj, por junuloj (11 ĝis 16jaraj) kaj eĉ por neesperantistoj. Programo : prelegoj, diskutoj kaj turismaoj.

Inf: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirsch-weng-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler, Germanio. Tel: +49-(0)2641-4885, fakso: +49-(0)2641-978666. psi@esperanto.de

SAT-kongreso ; La Chaux de Fond (Svislando) Julio 12 - 19

76-a Kongreso de S.A.T. en La-Chaux-de-Fonds, Svisio. Inf: S.A.T., 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris,Francio. Tel: +33-147978705, fakso: +33-147977190.satesper@noos.fr

**UK Göteborg (Svedio) Julio 26 – Aŭg 03 Tutmonda Kongreso de Esperanto**

88-a Universala Kongreso en Gotenburgo. Inf: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-436144, +31-10-4361751, kongresoj@co.uea.org

**IJK Lesjöfors (Svedio) Julio 19–26 Tutmonda Junulara Kongreso**

Internacia Junulara Kongreso en Lesjöfors. La temo: "Al Libera KulturO" (ALKO).

Inf: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-2015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044. oficejo@tejo.org www.tejo.org/ijk

## Nos rendez-vous espérantistes dans la région :

- Collonge la-Rouge .15-16-17.marto : Franca Kongreso de Fervojistoj
- Cap d'Agde 19-21 aprilo, **Kongreso de SAT-Amikaro**, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. Tel: +33-(0)147978705, fakso: +33-(0)1.47.97.71.90. satesper@noos.fr
- Gaillac : dim. 29 juin : Esperanta festo ĉe ge-Funel

*Ni tenas je via dispono precizigojn kaj aliĝilojn por preskaŭ ĉiujn suprajn renkontiĝojn.*
**Por ĉiuj aliaj renkontiĝoj en la mondo, konsulti nin, aŭ :**

http://www.eventoj.hu/2003.htm
www.esperantoland.org/renkontighoj (kun mapoj)